Raporto pri INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO

10 Majo 2009

Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo estis fondita de Charlotte Kohrs kaj kelkaj amikinoj en San-Diego, Kalifornio en Majo 1987. Charlotte ne nur instruis Esperanton al infanoj en San-Diego sed ankaŭ produktis kelkajn videobendojn, elsendis duonjarajn bultenojn por infanoj, komponis kantojn por instrui Esperanton al infanoj, kaj verkis libretojn, kiuj povas servi kiel lernolibroj por infanoj. Oni povas akiri iujn materialojn perpoŝte de EUSA, UEA, aŭ mi kaj perrete ĉe <www.iĉlm.org>.

En la jaro 2001 mi konsentis iĝi la Direktoro de Infanoj ĉirkaŭ la Mondo, kaj en la jaro 2003, post la morto de Charlotte, mi transportis al mia domo en Sankto-Luiso ĉiujn materialojn, kiujn Charlotte amasigis en San-Diego. Sekve, mi povis respondi al petoj por ĉi tiuj materialoj kaj produkti pluajn ekzemplerojn el ili kiam ili estas bezonataj. Antaŭ kvar jaroj mi sendis ekzemplerojn de ĉiuj tiuj libretoj al Katalin Kovats en Nederlando, por ke ŝi povu priskribi ilin en <www.edukado.net>, la retejo por instruistoj internacie. Mi ankaŭ kutime montras kelkajn IĈLM-materialojn ĉe la Monda Foiro ĉe la U.K.-oj.

Mi komunikas kun kelkaj instruistoj de Esperanto en aliaj landoj, aparte tiuj kies lernantoj ne povas uzi komputilon. Ofte mi sendas senpage instru-materialojn, inkluzive de papero kaj skribiloj. Tri al kiuj mi sendis materialojn dum la pasinta jaro estas KIZEYIDIOKO MAYINDA [Matadia, Dem. Rep. of CONGO], EZIN Mechak [Glazoue, BENIN] kaj GBADAMASSI Latifou [Lokssa, BENIN]. Latifou nun decidis starigi novan organizon "Infanoj chirkaŭ Afrika."

En 2005 Enriko Ellemberg konsentis mastrumi kaj plibonigi nian retpaĝon <www.iĉlm.org>. Sekve estas pli da materialoj, kaj kelkaj el ili estas tradukitaj en la hispanan lingvon krom la anglan. Enriko verkis mallongan artikolon pri la retpaĝo de IĈLM kiu aperis en INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO, 08/1, paĝoj 30-31, kaj li daŭre aldonas novan materialon tie, eĉ kelkajn videofilmojn. Dum la pasinta jaro Johan Derks de Nederlando elsendis videofilmon de homoj en Burundo kiuj kantas la "Kanton de la Koloroj" de nia IĈLM-retpaĝo per Youtube <www.youtube.com:80/watch?v=QmW06-FUqD4>. Vi povas vidi ĝin ĉe <www.iĉlm.org>.

<u>IĈLM nun treege bezonas monon</u> ĉar ni elspezis pli da mono ol ni havis en nia kaso. Vi povas sendi ĝin al la oficejo de EUSA kun indiko ke ĝi estas por IĈLM.

Ronald J. Glossop, <rglossop@mindspring.com>, Direktoro, IĈLM.

---

10 Majo 2009

Children Around the World was founded by Charlotte Kohrs and some friends in San Diego, California in May 1987. Charlotte not only taught Esperanto to children in San Diego but also produced a few videotapes, sent out semiannual newsletters for children, composed songs to teach Esperanto to children, and wrote booklets which could serve as textbooks for children. One can acquire those materials by mail from EUSA, UEA, or me and on the internet at <www.iĉlm.org>.

In the year 2001 I agreed to become the Director of Infanoj ĉirkaŭ la Mondo, and in the year 2003, after the death of Charlotte, I transported to my house in St. Louis all the materials which Charlotte had amassed in San Diego. Consequently, I was able to respond to requests for these materials and to produce additional copies of them when they are needed. Four years ago I sent copies of all these booklets to Katalin Kovacs in the Netherlands so that she could describe them in <www. edukado.net>, the web-site for teachers internationally, I also regularly display some IĈLM materials at the Monda Foiro at the U.K.s.

I communicate with some teachers of Esperanto in other lands, especially those whose pupils are not able to use a computer. Often I send without charge instructional materials, including paper and writing instuments. Three to whom I sent materials during the past year are KIZEYIDIOKO MAYINDA [Matadia, Dem. Rep. of CONGO], EZIN Mechak [Glazoue, BENIN], & GBADAMASSI Latifou [Lokssa, BENIN]. Latifou has decided to found a new organization "Children around Africa."

In 2005 Enrique Ellemberg agreed to manage and improve our web-site <www.iĉlm.org>. Consequently, there are more materials, and some of them are translated into Spanish as well as English. Enrique also wrote a short article about the web-site of IĈLM which appeared in INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO, 08/1, pages 30-31, and he continually adds new material there, even some videotapes. During the past year a film which showed people in Burundi singing "Song of the Colors" from our IĈLM website was made by Johan Derks of the Netherlands and sent by Youtube <www.youtube.com:80/watch?v=QmW06-FUqD4> to the whole world. You can see it at <www.iĉlm.org>.

<u>IĈLM desperately needs money now</u> because we have spent more money than we had in our treasury. You can send it to the office of EUSA with an indication that it is for IĈLM.

Ronald J. Glossop, <rglossop@mindspring.com>, Director, IĈLM.